




pola esperantisto

sendependa revuo
de polaj esperantistoj

fondita en 1906 ★ n-ro 3/2005 ★ ISSN 0032-2431



3
2005

Enhavtabelo:

- 3** La tempo... maturiĝas!
Kazimierz Leja
-
- 4** Omaĝe al... Karol Wojtyła
Zofia Banet-Fornalowa
Pola Parlamento
Josef Šemer
Bogusław Sobol
-
- 8** ... Lidja Zamenhof
La nomo de Lidja Zamenhof aldoniĝas al
la listo de Jad Vašem
Josef Šemer
-
- 9** Itô Kanzi
Forpasis Ludovikito
UEA
-
- 10** La Movado
Partnerurboj Góra kaj Herzberg
Andrzej Kiszkiel
-
- 11** E-kurso en la Universitato de Tria Aĝo
Antoni Doroz
-
- 12** Sława – jubilea rentkontiĝo
Andrzej Kiszkiel
-
- 13** Generacia stafeto
Jerzy A. Walaszek
-
- 14** Postimpresoj pri Bulonja jubileo
Jerzy A. Walaszek
-
- 16** Genealogio kaj Esperanto
Edward Wojtakowski
-
- 17** Polaj AKEL-partneroj ĉe ibera duoninsulo
Luís Ladeira
-
- 26** ILEI iĝis oficiala patrono de pola lernejo
Scienca festivalo
Esperanto en internacia junulara festivalo
Maria Majerczak
-
- 21** Kiel tradukiĝas Eŭropo?
Agnieszka Prokurat
-
- 24** „Sed homoj kun homoj“, historio pri cent
jaroj de Universalaj Kongresoj
UEA, Ziko M. Sikosek

26 Novaj Honoraj Membroj de PEA
Bonŝanca kunveno en Pelplin
Jerzy A. Walaszek

28 Ĉu sanktuloj parolas Esperanton?
Katarzyna Tempczyk

28 „Juna amiko“ aperas kun pli dika aspekto

28 Al ĉiuj biciklantoj!
Kazimierz Okoński

29 Preskaŭ ĉio pri la prepozicio „DE“
Czesław Baranowski

32 Diversaj informoj.

Pola Esperantisto

sendependa revuo de polaj
esperantistoj. Aperas 6 fojojn jare.
N-ro 3/2005 – ISSN 0032–2431
eldonkvanto (nakład): 250 ekz.

Redaktoro: Kazimierz LEJA

Ĉiujn korespondaĵojn kaj kontribuojn sendu
nur al la redaktoro.

TTT-paĝo: www.hejme.e-tools.pl

Retpoŝto: kleja@hejme.e-tools.pl

Tel.: (+48 32) 265 00 38 (nur vespere!)

*La redaktoro rezervas al si rajton
mallongigi kaj redakti la tekstojn.*

Jarabono enlanda: 30,00 PLN pagenda al:
Wydawnictwo Hejme, PL 41–250 Czeladź,
str. Wąska 21, skrytka 59
mBank: 36 1140 2004 0000 3202 3141 1644

Jarabono eksterlanda: 12,00 EUR pagenda
al: UEA-konto: <kazl-s> aŭ FEL-konto:
<leja- t>. Por aerpoŝta sendado aldonu 6
EUR. Nepre informu eldonejon pri via pago!

La tempo maturiĝas!

Kiel plej bone esprimi pasantan tempon? Oni ofte uzas titolan esprimon: *la tempo maturiĝas*. Tiu ĉi esprimo povas porti multajn emociojn. Kiam juna homo maturiĝas, liaj parencoj certe ĝojas, ĉar jen la nova estaĵo fariĝas memstara, matura, do povanta pli saĝe agi, zorgi pri si mem.

Kiam maturiĝas vino, ties ŝatantoj ĝojas pro baldaŭa degustado. Same pri fruktoj, legomoj, ktp.

Kiam maturiĝas la tempo, subkonscie oni metas la demandon: *por kio?* Maturiĝo de tempo signifas ja ĉiam, ke ekestis momento „por”.

Rigardante la kalendaron oni povas listigi aferojn, por kiuj la tempo iĝis matura: ĉu en nia privata vivo, ĉu en politiko, ĉu en niaj Esperanto-ri-latantaj okupoj. Maturiĝas la tempo por la UK en Vilno, la IJK en Zakopane, kaj kelkaj aliaj okazontaĵoj. Kun ĝojo mi povas ankaŭ konstati, ke en kelkaj regionoj de Pollando la tempo maturiĝis por efektiva, fruktodona agado de esperantistoj, kun jam signifoplenaj atingoj. Legu diligente la revuon kaj ankaŭ vi samopinios...

Al tiuj ĉi signifoplenaj okazintaĵoj aldoniĝas, post tre (tro?) longa tempo, la decido de la Ĉefa Estraro de Pola Esperanto-Asocio, laŭ kiu kvar niaj gekolegoj ricevis la Honoran Membrecon de PEA, kaj ĉiuj iamaj

agantoj ofenditaj dum „totalisma periodo” estis pardonpetitaj pro faritaj al ili maljustaĵoj.

Sed ni starigu ankaŭ la demandon alian: kiom da aferoj ĝis nun atendas sian „maturiĝon”? Kiom longe ni ankoraŭ atendu por vera unueco de niaj vicoj, niaj entreprenataj taskoj? Kiom longe ni, polaj esperantistoj, agos dividitaj, ne povante ĝui tutlandan etoson de multnombra, forta samideanaro?

Kiel eldonisto mi devas malĝoje konstati, ke la tempo maturiĝis nek por eldonadi *Polan Esperantiston* ĉiunmonate (pri kio demandis kelkaj personoj), nek por doni al ĝi apenaŭ plenkoloran kovrilon (pri kio petis aliaj). Ne maturiĝis tiuj, kiuj promesadis kunlabori, kaj gajni plurajn abonantojn. Ankaŭ eldonado de Esperantaj libroj ne povas disvolviĝi pro la samaj kialoj: sen helpo de lokaj esperantistoj, ilia informagado, organizado de E-kursoj kaj prelegoj nenio povas pliboniĝi tiurilate. Nevenditaj libroj malhelpas eldonon de la novaj.

Eble maturiĝas jam tempo por kompreni, ke nur forta, tutlanda (en iu ajn organiza formo) esperantistaro povas fronti alproksimiĝantajn defiojn kaj venki malfacilaĵojn. Pripensu tion, agantoj!

tamen esperanto

Omaĝe al...

...Karol Wojtyła

Plene konvinkitaj, ke teatro, kaj aperte la Esperanta... devas ludi ĝis la fino de l' mondo kaj unu tagon pli, malgraŭ problemoj iom malhelpantaj, nia varsovia Esperanto-Teatro „Espero” lanĉis en septembro 2004 sian, jam 23an, sezonon per spektaklo „Rimleteroj” bazitan je poezia korrespondado inter Marjorie Boulton kaj William Auld.

Kiel kutime ĉiuj niaj spektantoj ricevis presitan por la tuta sezono 2004/2005 liston de repertuaro. Kaj ĉar aro de niaj fidelaj spektantoj regule venas al ĉiumonataj teatraj prezentoj, antaŭitaj per koncerna prelego, la prezentoj sinsekve okazadis.

Pro forpaso la 2an de aprilo de la Papo Johano Paŭlo la Dua kaj sekve anoncita funebra semajno, ĉiuj artaj prezentoj, en tio teatraj, estis nuligitaj. Ekestis necerteco, kion ni faru... La planata por la 4a de aprilo prezento iel kongruis kun la etoso, ĝenerale tiutempe reganta en nia lando. Laŭplane ni devis prezenti monodramon „La Jubileo”, verkitan okaze de Centjariĝo de Esperanto-Teatro de mi, kune kun Harold Brown.

Per ĝi ni celis omaĝi al Esperanto-aktoroj, en sia grandparto forpasintaj. Ankaŭ Harold, la kunaŭtoro de la teatraĵo forpasis la 10an de mar-



to pasintjare. Lige kun tio mi planis aŭdigi antaŭ la spektaklo prelegon s.t. „Kontribuo de Harold Brown al Esperanto-teatro”. Interkonsente kun la estraro de Art-Galerio „Nusantara” ni decidis nian teatran renkonton okazigi.

Morto de la Papo, kiu krom granda kontribuo je pluraj kampoj ankaŭ evidentigis signifan interesiĝon pri teatro, komenciĝinte de la gimnaziaj jaroj, poste studentaj, instiganta de krakova kreanto kaj reĝisoro Mieczysław Kotlarczyk, kaj ĉefe laŭ sia propra inklino, ne estas vaste konata. Li ludis en teatraj junularaj ensembloj; unue en sia naskiĝurbo Wadowice kaj poste dum studentaj jaroj en Krakovo. Samtempe li komencis verki dramojn. Tiuj laŭ teatro-konantoj ne atingis pinton de vidpunkto de dramaturgio, nome de bezonoj de scenejaj normoj, sed ili estas valoraj intelekto kaj enhavas profunde humanismajn kaj moralajn mesaĝojn. Tiukaŭze valorus dum tiu funebra semajno omaĝi al Li per memorigo al niaj spektantoj, konigo de Lia verkado por la teatro. Kaj tiel okazis. Ni decidis prokrasti prelegon, dediĉitan al Harold, kaj anstataŭe aŭdigi informon pri Karol Wojtyła – la dramverkisto.

Pro necerteco pri okazigo de prezento ĉeestis modesta aro de niaj teatro-amikoj. La kunvenintoj kun kontento aŭskultis prelegeton, kiu – mi esperas tion – vastigis ilian scion pri la Granda Forpasinto. Komprenigis kial ĝuste Li – poeto, homo profunde sentema, okupiĝis pri teatro.

Krom pri la soci-filozofia fono de ties verkado kaj aktorado mi iom analizis ilian enhavon, mesaĝon, ĉefe surbaze de lia plej konata dramo: „Brat naszego Boga” (Frato de nia Dio), eminente enscenigita en Nacia Teatro en 1989 jaro de rekonata reĝisorino Krystyna Skuszanka.

Jerzy rolis du personojn en ĉi kortuŝa spektaklo. La ĉefrolon pri granda karitulo, pentristo Adam Chmielowski – Frato Alberto, plenumis Krzysztof Chamiec. La spektaklo estis filmita kaj sendita donace al la Papo. Ĉeokaze mi memorigis, ke antaŭ pluraj jaroj rekonata pola aktorino, tre merita ankaŭ por Esperanto-teatro, Jadwiga Gibczyńska, pretigis surbaze de alia dramo de Karol Wojtyła: „Antaŭ vendejo de juvelisto” spektaklon „Signaloj”, laŭ Esperanta traduko de Tyburcjusz Tyblewski, kiun ŝi plurfoje kun sukceso prezentis. Por la fino mi rekomendis la libron de Bolesław Taborski „Karola Wojtyła dramaturgia wnętrza” (Dramaturgio de interno de Karol Wojtyła). Eldonita de Eldonejo de KUL (Katolika Lublina Universitato), Lublin 1989, vaste traktanta priparolitan temon.

En la dua parto estis prezentita „La Jubileo” filmforme. Ĝi estis farita

de Wim Posthuma el Västerås, Svedio dum la 5a Kultura Esperanto Festivalo okazinta en la jaro 1996 en Kopenhago, okaze de Centjarigo de Esperanto-teatro. La teatraĵo ne nur memorigas glorajn kartojn de nia teatro, sed ankaŭ formas dignan omaĝon al dekoj da Esperanto-aktoroj. Memorigas ties meritojn por Esperanto-kulturo kaj por formigo de identeco de Esperanto-komunaĵo. La spektaklo estis de KEF-anoj tre varme akceptita, simile plurloke.

Oni kredu, ke la menciita prelego pri dramverkado de Karol Wojtyła, samkiel prezentita videe „La Jubileo” kontentigis la aron de spektantoj kunvenintaj en Art-Galerio „Nusantara” la 4an de aprilo ĉi-jare. Valoras aldoni, ke la etoson de la vespero profundigis deklamita pollingve de Jerzy Fornal poemo de Juliusz Słowacki „Pośród niesnasek Pan Bóg uderza...” (Dum la malpaco Dio frapas...), en kiu la poeto aŭguras venigon de slava papo kiu signife kaj pozitive influos spirite la mondon.

Ĉi sezono atendas nin ankoraŭ du teatraĵojn prezentitojn, kiel kutime antaŭitaj de koncernaj prelegoj pri Esperanto-kulturo. La 2an de majo Jerzy prezentos „Vagabondo” de Harold Brown, kiun mi antaŭos per prelego „Harold Brown la dramverkisto”. Ni finos la sezonon la 7an de junio per monodramo „Apologio de Sokrato” laŭ Platono. La prezenton antaŭos konversacio pri antikva teatro.

...Kaj kio pri la estonto, ni vidos...

...Stimulas nin daŭre labori tiu-

kampe konscio, ke tio, kion oni faras, estas bezona, almenaŭ por aro de Amikoj, ŝatantoj de Esperanto-teatro. Tamen ne ĉio dependas de bonvolemo. Kio ajn ni estas eperantistoj, ni do esperu, ke la laboro estos iel daŭrigota.

Varsovio, aprile 2005

Zofia Banet Fornalowa

PS. Jen kion skribis unu el la plej kleraj esperantistoj, iama kunredaktoro de „Norda Prismo” Mogens Groth, ĉeestinta s.m. 5an KEF, pri „La Jubileo” (publikigita en „Dana Fervojisto”, oktobro 1996):

Pro 100—jara Jubileo — brila Fornalaĵo

Kadre de la Kultura Esperanto-Festivalo 5 en Kopenhago, Kultura Ĉefurbo de Eŭropo 1996 ni omaĝas la aktorojn, kiuj pasinte kaj nune laboras kaj kontribuas al la altiĝo de la Esperanta kulturo dum la nun pasintaj 100 jaroj.

Pro kaj por la Centjariĝo la aŭtoroj Zofia Banet-Fornalowa kaj la britsveda Harold Brown kreis teatraĵon „La Jubileo”, kaj ĝin ĝuis en Kopenhago publiko en plenplena salono.

Oni spektis, ke vestgardisto Mike-lo trarigardas la teatrajn vestojn kaj rekvizitojn de la Esperanto-teatro, ĉar li atendas translokiĝon al nova sidejo-teatro. Liaj okuloj vidas ne nur la diversajn objektojn sed ankaŭ memore rigardas la bildojn pri la pasinto... Ni aŭdis kaj aŭskultis partojn de

deklamado, satiro, resumo de la evoluo de la Esperanto-teatro ekde monologo de Hamleto iam deklamita de Adela Schäfer dum la Bulonja Kongreso... ĝis la nuntempa f-ino Barla-ton.

La spektaklo, kiu kortuŝis la spektantojn dum KEF 5, montras pruve ke la Esperanto-parolantoj ŝatas emociiĝi per ekkono de siaj radikoj.

Por tiu celo servas animtuŝe brile tiu „Jubileo”, artisma kaj inspira kontribuo de Zofia kaj Jerzy Fornal kaj Harold Brown. Bravo!

Pola Parlamento omaĝe al la mortinta Papo Johano Paŭlo la 2a

La 6an de aprilo tagmeze kunvenis pola Parlamento por omaĝi la mortintan Papon. La solenan kunvenon partoprenis, krom la parlamentanoj de Sejmo kaj Senato, ankaŭ pola prezidento, ĉefministro, multaj ŝtatestroj, episkopoj, eksterlandaj diplomatoj ktp.

Post la enkonduko fare de marŝalo de la Sejmo oni montris la filmon pri la Papo Johano Paŭlo la 2a dum Lia vizito en pola Parlamento la 11an de junio 1999.

Estis ebleco aŭskulti tiujn gravajn vortojn, kiujn tiam pola Papo en pola Parlamento eldiris, kiuj estas gravaj por ĉiam, kaj ĉiam oni devas al ili reveni, ilin rememori, por vivi, labori, agi, ĉar ni devas vere la instruojn de la Granda, neforgesebla Papo, en-



Mi sendas al ĉiuj poloj kaj katolikoj mian simpation kaj kondolencojn pro la forpaso de la Sankta Papo Johano Paŭlo la Dua.

Karaj katolikaj esperantistoj!

Kiel judo mi dum multaj jaroj ege altaprezis la Sanktan Papon Johano Paŭlo. Li estis vere GRANDA homo, kiu multe strebis por internaciaj paco kaj bono kaj interalie multe faris por repacigi judojn kaj kristanojn. Li batalis kontraŭ la antisemitismon kaj rilatis tre pozitive al la juda popolo. Tiujn meritojn oni aldonu al la multaj aliaj meritoj kiujn la Papo havis flanke de la tuta homaro.

Je la nomo de la israelaj esperantistoj mi kondolencas al vi, anoj de la katolika kaj kristana mondo, pro la forpaso de la Papo kaj aliĝas al via malĝojo.

Josef Ŝemer
Prezidanto de Esperanto—Ligo
en Israelo
Tel—Avivo, Israelo (La Sankta Lando)



konduki en nian ĉiutagan vivon.

Post la rememoraĵoj de la filmo la marŝalo tralegis la rezolucion de la Parlamento, kiun la partoprenantoj aŭskultis silente kaj fine omaĝis la morton de la Papo ankaŭ preĝante: „Patro nia...” kaj „Eternan ripozon donu al li Sinjoro”.

Boguslaw Sobol

Karol Wojtyła kaŝis fortan humuron, kiu aperis dum plej diversaj okazoj. Tre vasta estas la anekdoto pri liaj plej amuzaj kaj trafaj eldiroj. Jen la plej konataj.

Dum unu el siaj vojaĝoj al Afriko oni prezentis al li reĝon akompanatan de sinjorino.

„Via Sankteco, jen la reĝino—patrino” oni diris al li prezentante la sinjorinon. Konstatante, ke ŝi estis relative juna, Johano Paŭlo la 2a demandis kun granda surprizo: „Ĉu ŝi estas la patrino de la reĝo?”

„Ne, Via Sankteco, ŝi estas la patrino de la gefiloj de la reĝo, unu el la ok edzinoj de la reĝo”.

„Ha, mi komprenas — ridetis Wojtyła kun aplombo — mi vidas, ke ĉi tie ni estas ankoraŭ en la Malnova Testamento”.

En Introd, la vilaĝeto de Aostavalo (alpa regiono de Italio) kie li ofte trapasis la somerajn feriojn, iun tagon grupo de personoj kiuj faris ĉion por esti rimarkitaj de la Papo, estis blokita de la firmaj korpogardistoj de la Papo. La Papo, sufiĉe scivolema pri tiom da bruoj, demandis, kiuj ili estas.

„Via Sankteco, ili estas ekster—eŭropanoj”.

„Nu, kion ni atendas por iri al ili, konsiderante, ke ankaŭ mi estas ekster—eŭropano” (noto: Vatikano ne aliĝas al la Eŭropa Unio. La diro havas tamen pli fortan fonon: per la vorto „ekstereŭropano” oni ĵargone indikas en la itala lingvo la enmigrintojn el alikontinentaj landoj).

Sendis: Bogusław Sobol

La nomo de Lidia Zamenhof aldoniĝas al la listo de Jad Vašem

Fine de 2004, la israela institucio por memorigo de la Holokaŭsto, **Jad Vašem**, inaŭguris interretan paĝaron, kiu prezentas la nomojn de tri el la ses milionoj da judaj viktimoj de la Holokaŭsto. Jad Vašem konsideras tiun ĉi kampanjon kiel sanktan moralan devon kaj honorigon al la pereintoj, komplezon de la postrestintoj al la judaj viktimoj.

La intenco estas kompletigi la liston, ĝis trovado de la lasta nomo.

La kolektado de nomoj komenciĝis jam en la 50aj jaroj, precipe inter la postrestintoj kiuj alvenis Israelon, sed en la lastaj jaroj ĝi pli kaj pli disvastiĝis en la tuta mondo.

En januaro 2005 mi ricevis leteron de belga esperantisto, kiu petis intervenon de la israelaj esperantistoj por aldoni al tiu ĉi listo la nomon de Lidia (Lidja) Zamenhof. Evidentiĝis, ke la nomo de la filino de L. L. Zamenhof, tre aktiva esperantistino pereinta en Treblinka, ankoraŭ ne aperas en tiu listo de la viktimoj. Kutime, tiuj kiuj plenigas la skriban peton pri aldono de nova nomo, estas la familianoj de la pereinto. En la kazo de Lidia ne alvenis ĝis nun tiu peto. Menciin-

das, ke la petinto devas plenumi oficialan „Atesto-Paĝon” de Jad Vašem, en kiu li devas doni detalojn ankaŭ pri la cirkonstancoj de la morto de la familiano aŭ konato. Temas do pri plimalplia „atestado”.

Tial mi turnis min al s-ino Ewa (Eva) Toren el Tel-Avivo, kiu en 1993 rakontis dum Zamenhof-Festo al la israelaj esperantistoj pri sia konatiĝo kun Lidia Zamenhof, kiu loĝis samstrate en la varsovia geto kaj kiun ŝi ege admiris. Ŝi rakontis kiel ŝi vidis Lidian suriri la vagonaron, kondukantan judojn de Varsovio al la koncentrejo Treblinka. Pri tiu lasta renkontiĝo inter Ewa kaj Lidia, okazinta la 5an de septembro 1942, aperis artikolo en **Israela Esperantisto** n-ro 113 (1993). Poste sekvis mencioj de tiu rakonto en la libro de Zofia Banet-Fornalowa **La Familio Zamenhof** (2000) kaj en kelkaj publikaĵoj de la Bahaaj Esperantistoj (Lidia aliĝis al la Bahaa religio).

Ricevinte lastjanuare la peton de la belga samideano, mi petis de Ewa permeson plenumi la formularon ŝianome kaj subskribigi ŝin. Post ricevo de la formularo de Jad Vašem

mi iris al la hejmo de Ewa en Tel-Avivo, kiu hazarde troviĝas proksime de la Esperanto-klubejo en Domo Bikurej Haitim.

Tio okazis la 27an de januaro 2005 posttagmeze. Ni sidis kune kaj plenigis la atestopaĝon. Samtempe la televido funkciis, kaj montris la ceremonion okazintan ĝuste tiam en Auschwitz (Aŭŝvico), Pollando, memore al liberigo de la koncentrejo okazinta precize antaŭ 60 jaroj. Ni do jen spektis la paroladojn de la diversaj ŝtatestroj, jen plenigis la detalojn de la vivo kaj malbonsorto de Lidia. Ĉu hazarda koincido? Aŭ eble Fingro de Dio? Kiu scias?...

Tiumomente Ewa rakontis al mi denove pri tiu lasta renkontiĝo kun la 38-jara Lidia, kiu marŝis fiere al la vagono en Umschlagplatz. Ewa kaj ŝia patrino sukcesis postvivi la militon kaj tio ebligis al ni aŭdi de ŝi la rakonton pri la lastaj horoj de la filino de la kreinto de Esperanto.

La morgaŭan tagon mi sendis al Jerusalemo la formularon, subskribitan de Ewa. Baldaŭ la nomo de Lidia Zamenhof (1904–1942) aldoniĝos al la longega listo, apud ŝiaj aliaj senkulpaj samnaciaoj, kaj tiel ĉiu Esperantisto en la mondo povos viziti la Retejon de Jad Vaŝem kaj trovi en ĝi ankaŭ ŝin. Post klavado, sur la ekrano montriĝos apud ŝia nomo ankaŭ tiu skanita atestopaĝo plenigita de mi, judo naskiĝinta jam en Israelo kaj adepto de L. L. Zamenhof, kaj subskribita de s-ino Ewa Toren, judino kiu naskiĝis en Varsovio kaj vivas nun en Tel-Avivo.

Forpasis Ludovikito

Post multjara malsano forpasis la 25an de aprilo en Kioto s-ro Itō Kanzi, en la Esperanto-movado konata kiel Ludovikito. Li naskiĝis la 15an de januaro 1918 kaj esperantistiĝis en 1959. Ke li eklernis Esperanton en la sama jaro, kiam oni prifestis la 100an datrevenon de la naskiĝo de L. L. Zamenhof, kvazaŭ aŭguris, ke kolektaĵo kaj publikigo de la verkoj de d-ro Zamenhof estis fariĝonta lia vivoverko, al kiu li sin komplete dediĉis dum pli ol tri jardekoj.

Kiam UEA petis lin verki biografieton pri si mem por la revuo „Esperanto”, krom la jaroj de liaj naskiĝo kaj esperantistiĝo, la linioj, kiujn li verkis, menciis nur: „komencis eldonadi la pvz-on en 1973”. Tiu modesta informo kaŝis en si kolosan laboron, pro kies eksterordinara valoro la Komitato de UEA distingis s-ron Itō per la honora membreco de la Asocio en 1990. La minuskle skribita PVZ – Ludovikito konsekvence ne uzis majusklojn – estas mallongigo de Plena Verkaro de Zamenhof, al kiu li aldonadis la vortojn „iam kompletigota”, ĝis li fine povis anstataŭigi ilin per „iel tiel kompletigita”. En tre bela fizika prezento tiu kompleto konsistas el 16 volumoj de originalaĵoj, 7 volumoj de tradukoj kaj 8 miksenhavaĵoj kromkajeroj. Laŭ alia redakta koncepto Ludovikito kunmetis ankaŭ tri volumojn de „iom reviziita plena verkaro de l.l. zamenhof” (Originalaroj I-III). Tria serio estas Ludovikologia Dokumentaro, „eble neniam



La Movado...

Partnerurboj Góra kaj Herzberg

Kiel vi jam scias [vidu la lastan n-ron de PE – red.] la urbestroj el Góra, Tadeusz Wrotkowski (Pollando) kaj Herzberg, Gerhard Walter (Germanio) decidis dum la marta renkontiĝo, ke ambaŭ partnerurboj



kompletigotaj necesaj aldonoj al la pvz”, kies plano antaŭvidis 26 volumojn, el kiuj aperis 21.

Jam antaŭ ol li komencis sian laboron pri la verkoj de Zamenhof, Itô Kanzi verkis pli ol 4000-paĝan japanlingvan biografian romanon pri la vivo de la aŭtoro de Esperanto. Ĝia unua volumo aperis en 1967 kaj la sepvo-luma verko kompletigis en 1973.

Iom pli frue forpasis ankaŭ s-ino Maeda Kimiko, kiu mortis 77-jara la 21an de januaro. Menciita en la verkoj de Ludovikito kiel „ unusola mia amikino”, ŝi estis lia sekretario en la eldonejo, kie s-ro Itô laboris kiel redaktoro de medicinaj faklibroj. Ŝi eklernis Esperanton kune kun s-ro Itô kaj estis poste, sub la pseŭdonimo „emilia k. m. ĝojkampf”, unu el la tri „provizoraj komitatoj” de PVZ. Ĉiujn verkojn de Ludovikito ornamis litografajoj de ŝia fratino, Tanaka Sachiko, plumnome „m. fruscieva”.

fonto: Gazetaraj Komunikoj de UEA

komencos realigi la pioniran projekton dank’ al kiu Esperanto servos kiel interkontaktlingvo. Kaj kio okazis ĝis nun? Feliĉe nur pozitivaj kaj multaj aferoj.

Unue kaptante la okazon, ke fine de majo okazos internacia E-renkontiĝo en proksima ripozejo ĉe la lago Sława, lubuŝaj aktivuloj proponis al la urbestro de Góra pli rapidan komencon de la instruado por instruistoj kaj por grupo de gimnazianoj ĉar oni jam sciis, ke al Sława alvenos grupo da lernantoj el Dresdena gimnazio kaj tio ĉi estus tre bona okazo por rapide senpere uzi la lingvon.

Dank’ al urbestro oni faris grandan varblaboron kaj okazis, ke estas pli da volontuloj por lerni la lingvon ol oni planis instrui unuavice. Fine oni aranĝis la instruadon por tri grupoj. Kiel konsentite jam marte, en la instruado helpas lubuŝaj esperantistoj. Gimnazianoj (gvidas Bożena Pietrzyk), oficistoj el la urbodomo (gvidas Władysława Kujaczyńska) kaj instruistoj (gvidas Andrzej Kiszkiel).

Aliĝis pli multaj kaj eĉ pretendis, ke estis diskriminitaj ĉar ne partoprenas la kurson.

La urboestro tiel serioze aliris al la afero, ke eĉ la kurso por oficistoj okazas kaj dum laborhoroj kaj en urbodomo. La gimnazianoj ricevis lernolibrojn senpage kaj en biblioteko

oni povas jam prunti la lernolibrojn. Jam oni pensas pri la fondo de la E-klubo kaj la loko estas jam preskaŭ promesita.

Ni preparas la kurseton por komencantoj kiu montriĝos en la loka 2-semajna gazeto.

Ni komencis la instruadon la 28an de aprilo kaj ni renkontiĝis 4 foje po 2 lecionaj horoj. La instruadon ni realigis laŭ la sama programo sed kun diversa intenseco depende de la grupo. Niaj „adeptoj” havis la unuan kontakton kun eksterlandanoj dum la renkontiĝo ĉe la lago Sława. Estis granda surprizo, precipe por ili, ke ili jam ne nur scipovas interparoli sed povas partopreni intensajn lingvajn okupojn sen uzo de la gepatra lingvo, ĉar la kurson gvidis Zsofia Kolody el la Interkultura Centro en Herzberg.

Al Sława alvenis ankaŭ ĉefzorganto kaj organizanto de la projekto, Peter Zilvar el Herzberg, kiu ofte kunportas sian valizeton kun multaj bonaj novaĵoj. Peter transdonis elkorajn salutojn de la urbeŝtraro de Herzberg por ni kaj por la urbeŝtraro de Góra. Dank’ al liaj agoj la kursanoj el Góra ekaŭdis tre bonan novaĵon: sep personoj de ili estas invititaj partopreni preskaŭ 3-semajnan kurson en la Interkultura Centro en Herzberg senpage!

Peter ankaŭ informis nin pri iliaj agoj en Herzberg, pri planita jam postnelonge konferenco kun gazetredaktoroj, kaj pri preparata multmedia reklamo de la projekto. Tre interesa informo estas tio, ke se ili sukcesos atingi ŝtatan subvencion

intencas inviti al Herzberg eĉ 20 personojn el Góra por 3-semajna senpaga intensa kurso.

La Ĉefa Estraro de PEA dum la kunsido en Pelplin gratulis al ni jam atingitajn rezultojn kaj decidis subteni niajn agojn laŭeble plej efektive. Oni proponis aranĝi venontan kunsidon ĝuste en Góra por substreki la gravecon de la projekto kaj helpi aranĝante la prelegojn por loka instruistaro kaj aranĝi ekspozicion de E-bildkartoj. Samcele al Sława alvenis la prezidanto de PEA Stanisław Mandrak gratulante al ĉiuj kaj precipe por novaj anoj el Góra.

Andrzej Kiszkiel



E-kurso en la Universitato de Tria Aĝo

En pasinta jaro oni establis en Radom la Universitaton de Tria Aĝo kaj ĝi funkcias surbaze kaj danke al helpo de Radoma Politekniko. En tiu ĉi Universitato aktive agas interalie estrino de loka filio de PEA, Anna Sałacińska.

Dank’ al ŝiaj zorgoj la 14an de marto 2005 okazis prelego pri Esperanto.

Partoprenis ĝin ĉirkaŭ 50 geaŭskultantoj. Prelegis Antoni Dorosz, prezidanto de PEA-filio en Radom. Rezulte de tio kelkaj personoj deklaris volon lerni Esperanton, do oni organizis la elementan kurson de la internacia lingvo.

Kurson gvidas la preleganto.

Antoni Dorosz

SŁAWA – jubilea Esperanto-renkontiĝo

Jam la 10a Internacia E-renkontiĝo okazis en Sława fine de majo. Kun helpo de belega vetero pli ol 70 gastoj salutis organizantojn de la aranĝo.

La plej abundaj estis gepoloj el lubuŝa regiono sed alvenis ankaŭ reprezentantoj de silezio kaj grandpolio. La eksterlandanoj reprezentis Francion, Germanion, Hungarion kaj eĉ Vjetnamon.

Dank' al belega vetero la partoprenantoj povis admiri la ĉirkaŭaĵon, naĝi kaj sunbruniĝi ĉar la ripozejo situas en la arbaro ĉe la bordo de la lago.

Grava estas la informo, ke 70% de nia regiono estas kovrita per arbaroj, do vi povas imagi kiel puran kaj sanan aeron ni havas kaj ke kiel vekiĝilo servis al ni la matena kanto de la birdoj ĉar lignaj kabanetoj, en kiuj ni dormis, staras inter pinarboj.

Dum la unua tago krom la individuaj interparoloj la ĉeestantoj kantis kun la akompano de gitaro kaj partoprenis la diskuton: „Ekstermovada aplikado de Esperanto” kiun gvidis Zdzisław Glajcar el Cieszyn.

Ĉi jaran renkontiĝon honoris Prezidanto de la Ĉefa Estraro de PEA Stanisław Mandrak, kiu informis nin pri la situacio en pola E-movado kaj rakontis tre interese pri renkontiĝo en Strasburgo kun Małgorzata Handzlik kaj aliaj Eŭrodeputitoj.

Samvespere la gastoj el Interkultura Centro Herzberg – Zsafia Korody kaj Peter Zilvar rakontis pri la

Interkultura Centro kaj raportis pri, jam tre fama, ĝuste realigata projekto por partnerurboj Góra kaj Herzberg – Interkomunikado kun uzo de Esperanto.

Sabate post la matena promeno kun la loka ĉicero Alfred Rosler okazis tre interesaj lingvaj okupoj por junuloj. Gimnazianoj el Drezdeno kun polaj freŝbakitaj junaj esperantistoj kantis, dancis, kriis, kaptadis aŭ montradis reciproke korpopartojn samtempe laŭte ridante pro amuzigaj situacioj. Ĉe akompano de la E-muziko la okupoj kune gvidis Grażyna Krzyżańska kun Karolina kaj Agata Kiszkiel.

Paralele la lingvaj okupoj por plenkreskuloj gvidis gaste Zsafia Korody. Ŝiajn, tre intensajn, okupojn partoprenis instruistoj kaj oficistoj el Góra, kiuj antaŭ 4 semajnoj komencis lerni la lingvon pro la partnerurba interkomunikad-projekto. Enkadre de la projekto ĝuste ili veturos julie al Interkultura Centro Herzberg por partopreni intensan, preskaŭ 3 semajnan kurson.

Post tagmanĝo Zsafia Korody daŭrigis siajn intensajn kaj interesajn okupojn kun scivolemuloj kaj en alia loko de la ripozejo Andrzej Kiszkiel faris kun aliaj 10 personoj lingvotrejnatan kvizon, kiu iomete lacigis la mensojn de la partoprenantoj, sed venkis ĉiuj partoprenantoj ekkonante la spritajn pensmanierojn kaj lertajn vortludojn.

Je la 16a geografo dro Leszek Sobkowiak rakontis pri Ĉinio „el meze” ĉar vivis tie 6 jaroj. Lia tre interesa rakonto kun lumbildoj kolektis plenan salon da aŭskultantoj kaj grandegan aplaŭdon.

Vespere dum „ĉefajra” renkontiĝo, kiun gvidis Andrzej Krzyżański oni enmanigis la dankdiplomojn por aktivuloj: Antoni Beyga, Bożena Pietrzyk, Zofia Szczygieł, Władysława Kujaczyńska, Andrzej Kiszkiel.

Dum artista parto estis deklamoj, kantoj kaj amuzigaj ludoj. Interalie la fragmenton de „Sinjoro Tadeo” deklamis Bożena Pietrzyk; Benoit Philippe kun gimnazianoj el Drezno prezentis germanan kanzonon, novaj esperantistoj el Góra kantis E–kanzonojn kaj poste pol–germanaj junuloj kun akompano de gitaro. La teatra grupo „Instigo” el Gorzów sub la gvido de Ludmiła Nowicka prezentis kelkajn skeĉojn kaj tre interesan teatraĵon „Laodamia” ĉefrole de Małgorzata Ławrynowicz. Tiel finiĝis la oficialaj aranĝoj sed multaj poste ĝis preskaŭ mateniĝo babiladis.

Dimanĉe ni ripozis kaj longtempe adiaŭis unuj la aliajn kun deziro de nova baldaŭa aŭ almenaŭ venontjara renkontiĝo.

Mi tre bone komprenas ĉiujn kiuj ĝuste nun bedaŭras, ke ne decidis aŭ ne povis alveni, mi tutkore kompatas kaj por eviti estonte tiel malagrablan senton mi havas ununuran solvon de la afero: ALIĜU jam nun al nia venontjara renkontiĝo.

Andrzej Kiszkiel
akis2@o2.pl

Generacia stafeto

Kiam en 1956 jaro polaj aŭtoritatoj permesis postmilitan refondigon de societaj kaj organizaj strukturoj, ligitaj kun socikultura movado en Pollando, Asocio de Esperantistoj en Pollando kun sidejo en Varsovio kuraĝis reaktivigi polan esperantistaron por denove alten levi la verdan standardon.

Tiutempe ekfloris verdaj postenoj en dekoj de polaj urboj kaj vilaĝoj kaj „senlaca kolegaro” komencis socikulturitan instrulaboron de fundamentoj. Inter aliaj estis dinamisma E–grupo el Dąbrowa Górnicza, kiu reaktivigis ne nur lokan E–filion sed ankaŭ Vojevodian Filion de Suprasilezia Esperanto–Asocio.

Tamen post dujara efektiva agado kronita per refondigo de proksimaj E–filioj en Będzin kaj Sosnowiec, sidejo de Vojevodia Filio estis translokita al Katowice kaj lokaj aktivuloj el Dąbrowa Górnicza, pro nekonataj hodiaŭ kaŭzoj, laŭgrade ĉesigis sian aktivecon.

Antaŭ kvin monatoj vizitis E–filion en Sosnowiec Rajmund Kubisa – pensiulo el Dąbrowa Górnicza kaj prezentiĝis kiel absolvento de E–kurso, kiun finis antaŭ kvardek jaroj en Dąbrowa G., kie lektoro estis Zdzisław Stelmaszyński, iama prezidanto de Vojevodia Filio.

Dum la kluba konversacio kol. Rajmund proponis organizon de E–kurso en Dąbrowa biblioteko kun celo refondigi post kvardek jaroj la imanan verdan postenon.

La kurson deklaris gvidi prezidanto de loka E-filio en Sosnowiec [sube subskribita – red.] surbaze de junulkurso lernolibroj eldonitaj en la Eldonejo Hejme.

Surloke, t.e. en Dąbrowa Górnicza okazis, ke pri la kurso ekinteresiĝis 14-persona junulara grupo de lernantoj, studentoj kaj eĉ instruistoj, kio esperigas pri bonaj perspektivoj de Esperanto, kion ni dankas al seninteresa transdono de Zamenhofa ideo al nova generacio de pola junularo.

raportis: J. A. Walaszek

Postimpresoj pri Bulonja jubileo

Kiam post dudekora busvojaĝo de Katowice al Lille mi kun bagaĝoj feliĉe ekstaris sur franca tero, kun ĝojo kaj intereso mi observis stratan panoramon de la urbo trankvile atendante privatan aŭtomobilon de loka esperantistino, kiu promesis transporti min al historia Bulonjo.

Mi, naiva feliĉulo, intencis ĉitage ankoraŭ partopreni sciencan simpozion en Bulonja Universitato, poste interparoli ĉe kafo kun francaj amikoj, vespere partopreni interesan muzikprezentadon en kongresejo kaj eble nokte promeni kun ĉiĉerono tra la urbo.

Estis ja matena horo: 8.30 kaj distanco al Bulonjo estis nur 90 km.

Ankoraŭ mi estis feliĉa kiam post unuhora atendado alveturis la interreta konatulino Anna kaj kun ridemo anoncis, ke ni devas iomete atendi je

alia pertrajne alvenonta esperantisto por jam senhalte kaj rapide kunvojaĝi Bulonjon.

Post unuhora, supraĵa vizitado de la urbocentro Anna iris al stacidomo por alkonduki la atendatan francan samideanon probable jam alvenintan al Lille.

Kiam post kelkaj minutoj ŝi revenis aŭtomobilon malpacience svingante per manoj, mi kuraĝis nur demandi, ĉu longe ni atendos la sudfrancan samideanon.

– Kara amiko – serioze konstatis Anna – de kelkaj tagoj estas en Francio striko de fervojistoj kaj malfacile estas respondi, je kioma horo alvenos la atendata kongresonto, sed ni devas lin pacience atendi, ĉar mi ankaŭ al li promesis transporton al Bulonjo.

Fine, je la 16a posttagmeze, mi alvenis kongresejon por konstati, ke la simpozio jam finiĝis kaj al la antaŭmendita hotelo mi povas promeni ses kilometrojn!

Post tridekora vojaĝado mia lacigita edzino ekploris ĉe akceptejo, sed feliĉe alveninta meksikanino per ĉarmaj gestoj kaj aŭguraj vortoj refortigis ŝian psikan ekvilibron, komentinte samtempe: – Karulino ne ploru, vi ja ĉion faris kaj faras nur por Esperanto.

Sekvonta, inaŭgura tago estis impona, majesta kaj multcelebra. Kiam 550-persona esperantista aŭditorio plenigis la historian urban teatron, organizantoj dum unu horo nur salutis kaj salutis aŭtoritatulojn, honorajn gastojn, sponsorojn kaj sin mem re-

ciproke, traktinte aŭditorion kaj reprezentantojn de 24 landoj kiel „publikon”, bezonatan por aplaŭdado. Onidire mankis tempo por kelkfrazaj salutoj eĉ en la kongresejo.

Restis nur individua ebleco fote, filme kaj fone (sone) rejestri jubilean eŝon de la unua Universala Kongreso de Esperanto.

Post aktora prezenado de unua Zamenhofa parolado la jubileaj partoprenantoj parade tramarŝis la urbocentron kun akompano de orkestro ĝis placo kun monumento al Zamenhof, kie urbestro de Boulogne – Frederic Cuvillier, prezidanto de LKK – Richard Valet, vicprefekto de Bulonja distrikto – Herve Malherbe kaj ĉefkonsulo de Pollando en Lille – Wanda Kalińska, post himnoj kaj paroladoj, metis florkronojn ĉe la busto de Zamenhof.

La orkestro fanfare akompanis esperantistaron ĝis malnova urbodomo, kie antaŭ cent jaroj estis honore akceptita L.L. Zamenhof kaj unuaj kongresanoj.

Same honore kaj respekte estis akceptitaj, per tro longaj paroladoj, finitaj tamen de ĉampano kaj kukoj, aktualaj jubileantoj de 100-jara datreveno de la unua E-kongreso.

Sekvaj tagoj plenigitaj estis de abunda prelega kaj ekskursiva programo, spicita de individuaj amikecaj renkontoj. Ĉi lastaj fruktos per reta kaj poŝta korespondado kun novaj amikoj. Neforgesebla estis prelega renkonto kun Claude Piron – psikologo, tradukisto kaj akademia instruisto, kiu post prelego pri perspekti-

voj de E-kongresoj kaj internaciaj renkontoj, simple, kompetente kaj pozitive prezentis valoran vizion kaj konstantan bezonon de internaciaj kontaktoj inter tutmonda esperantistaro.

Busa ekskurso ekster la 2-mil-jara urbo Bulonjo permesis proksimigi ĝian malnovan historion, ligitan ankoraŭ kun Romiaj Imperiestroj regantaj en norda Francujo kaj enkondukintaj tien kristanisman, kion dokumentas i.a. mezjarcenta katedralo al Sankta Virgulino, kie okazis Esperanta sankta meso, gvidata de loka episkopo. Same dum la unua Universala Kongreso de Esperanto, kiel post cent jaroj.

Notinda ŝajnas ekskurso laŭ paŝoj de Zamenhof, kiun kunorganizis francaj kaj anglaj esperantistoj. Speciale eksterlandaj ekskursanoj surprize observis submaran transportadon de multaj aŭtoĉaroj per hiperkonteneroj kiuj per t.n. „submanika tunelo” dum duonhoron transŝetis dekojn da aŭtoĉaroj de Francio al Anglio.

Surloke salutis nin t.n. angla nebulo, permesanta observi ĉestratan arkitekturon preskaŭ dronintan en „nebula lakto”. Tamen pli grava por kelkcent da ekskursanoj estis honora akcepto de Folkestone-urbestrino, regalinta vizitantojn per bongusta angla kafo kaj teo kun kukoj en plej reprezentanta hotelo de la urbo. Aldona, anglalingva parolado „a vista” estis esperantigita de prezidanto de Brita Esperanto-Asocio. Iomete grumblis la francaj esperantistoj, ke mankis „honora vino”, sed vizito en ekskluzi-

va restoracio York Prince forigis ĉies dubojn pri angla gastemo.

Sekva vizito en Dover-urbe- to permesis al urbovizitantoj admi- ri mezjarcentajn konstruaĵojn origine masonitajn el ŝtonoj, same preĝejojn kiel loĝdomojn.

La vizitadon finis folkloro prezen- tado de anglaj dancoj, ĉe teo, kafo kaj sandviĉoj en loka hotelo. Reveno al Bulonjo estis lasta okazo de amike- ca adiaŭo kun organizantoj kaj indivi- duaj amikoj antaŭ morgaŭa forvetura disiĝo.

Kaj denove feliĉe, per la sama traj- no de Bulonjo al Parizo, veturis ko- nata multjara ĉefdelegitino Luisa Ma- rin kun edzo kaj Andree Houlgatte, ambaŭ el Parizo, kiuj tranokte kaj in- forme helpis nin ĝenerale viziti kultu- ran ĉefurbon de l' mondo jam post la Bulonjaj eventoj.

Mi ne dubas, ke de tempo al tempo „navigare necese est”, por kom- preni alian homon kaj antaŭ ĉio bezonon de la lingvo internacia Espe- ranto.

raportis: Jerzy A. Walaszek

Geneologio kaj Esperanto

Ekzemplo de Góra (substerkinda estas kontribuo de PEA Filio el Zie- lona Góra) pruvas, ke ni devas di- rekti nian atenton al malgrandaj lo- koj. Mi kunlaboras kun Andreo Lazar, kultura aktivulo el la komunumo de Psary (distrikto de Będzin). Andreo estas 51-jara okulkuracisto kaj fer- vora genealogo. Mi redaktas por li genealogian retejon. Ĉefaj lingvoj de

tiu retejo estas la pola kaj Esperanto. Laŭtema indekso estas en 14 lingvoj.

La gento Lazar estas vere eŭropa gento kaj devenas el la landlima re- giono de Hungario kaj Vojvodino. En Pollando Lazaroj loĝas jam pli ol 300 jaroj ĉefe en la distriktoj de Cieszyn, Racibórz kaj Będzin. Diversaj linioj de tiu gento loĝas nuntempe en Bo- hemio, Bukovino, Hungario, Kroatio, Moravio, Slovakio, Slovenio, Vojvodi- no. Multaj elmigris el tiuj landoj al Usono, Australio, Sudameriko kaj aliaj regionoj de la mondo.

D-ro Andrzej Lazar kontaktiĝis ĝis nun nur kun polaj familianoj. Dank' al multlingva retejo li ricevas nun lete- rojn el diversaj landoj de la mondo en diversaj lingvoj, kiujn li ne konas. Mi donis al li lernolibrojn kaj li jam komencis aŭtodidakte lerni Esperan- ton. Lia frato Adam Lazar, kiu estas vicprezidanto de la distrikta konsi- lantaro en Będzin, lernis Esperanton junaĝe en teknikumo (probable li jam ĉion forgesis). Nun estas problemo kiamaniere konvinki membrojn de tiu internacia gento, ke ĝuste Espe- ranto povas faciligi iliajn internaciajn familiajn kontaktojn.

Sabate la 21an de majo Adam Lazar organizis en la kulturcentro en Gródków (komunumo de Psary) la 2an Kunvenon de la gento La- zar. Adreso de la retejo: http://eurogento.org/famgen/lazar/gento_lazar_eo.htm).

Similajn geneologiajn retejojn mi redaktas por 20 membroj de la Sile- zia Genealogia Societo. La 19an de majo okazis en Varsovio renkonto de



Letero el Portugalio

Polaj AKEL-partneroj ĉe ibera duoninsulo

Ĉi-lernojare la programo Socrates de Eŭropa Unio subtenis AKEL-projekton. Tio signifas ke tri lernejoj de tri landoj – Pollando, Hispanio kaj Portugalio – kune daŭris sian projekton por pliprofundugi eŭropcivitanekon per Esperanto.

Ĉi-projekto (vidu ekzemple www.euro.za.pl kaj www.esec-bramcamp-freire.rcts.pt (surklaku «projectos» kaj «akel»)) devigas E-lernadon kaj enkondukon al naciaj lingvoj de siaj partneroj. La plenumo de kelkaj paŝoj prezentas per interreto la partoprenantojn mem, siajn lernejojn, urbojn kaj landojn.

Lernjare 2004/05, krom aliaj paŝoj la partneroj preparis siajn intervizitojn.

La unua, okazinta inter la 13a kaj la 19a de februaro 2005 jaro, alvenigis je ibera duoninsulo la polajn AKEL-



EF

genealogoj, dum kiu poldevena kuraĉistino el Kanado Małgorzata Nowaczyk subskribadis sian novan libron s.t. „Poszukiwanie przodków, Genealogia dla każdego”. Prauloj de s-ino Nowaczyk devenis el Grandpolio, Lvova Regiono kaj Supra Silezio. La varsovia kunveno okazis sub patroneco de la semajnrevuo „Wprost”.

Kun amikaj salutoj

Edward Wojtakowski el Vroclavo

partnerojn. En Portugalio, la programo disvolviĝis ĉe la lernejo, matene, kaj eksterlernejo, posttagmeze. La tagmanĝojn oferdonis la lernejo. Matenmanĝoj kaj vespermanĝoj ĉe gastigintoj. Dum la mateno okazis klasoj de Esperanto, kaj de portugala lingvo, krom libera tempo por retumado. Posttagmeze, ĉiutage kaj laŭvice, ni vizitis la malaltan urbon de Lisbono, kaj aliajn partojn kiel Belem kaj Nacia parko, krom najbaraj vilaĝoj de Cascais kaj Sintra. Neforgesebla Roka kapo, la plej okcidenta eŭropa loko, kies atingita celo tre ĝojis la vizitintoj. Similan senton vekis la vizito al oceanumaro kaj la vidindaĵo de Oceano Atlantiko ĉe Cascais.

Je la 18a, vendrede matene, ĉiuj el ni busveturis al niaj hispanaj partneroj de Don Benito, en la hispana ekstremaduro. Tie, post la formala tamen amika akceptado en la lernejo, ni tagmanĝis kune kaj kune veturis al mezepoka urbo de Trujillo. Reveninte, ĉiu gastigis ĉe sia gastiganto kaj ripozis. En la sekva tago, sabate, post bilanca kunsido de la partneroj, vizito al urbo de Don Benito kaj tagmanĝo, ĉiu revenis hejmen; poloj busveturante tra Barcelono kaj Strasburgo, kaj ni rekte al Lisbono.

Kuriozaĵo estis la pola elekto de buso por veturi inter Koŝalino, en Polio, kaj Lisbono. Fakte tre longa vojaĝado eblis la viziton de Parizo, Madrido, Barcelono kaj Strasburgo, krom «Fatima», Lisbono kaj «Don Benito»/«Trujillo». Vere laca, tamen riĉa opcio. La gastigado ĉe lernantoj kaj instruistoj plifaciligis la restadon

kaj helpis la kunvivadon. Vizitis nin kvar gelernantoj kaj kvar instruistinoj de la lernejo «Gimnazjum n-ro 7 de Koŝalino». Aliaj kvar gelernantoj kaj tri geinstruistoj portugaliaj de mezlernejo «Braamcamp Freire – Pontinha» kune veturis al Hispanio.

Tre amuza kunvivado. Per Esperanto? Bedaŭrinde ne tiom, kiom oni dezirus!

Iberaj partneroj en Koŝalino

La trapasanta renkontiĝa loko estis Berlino je la tria de aprilo. Ni tamen flugveturis de Lisbono ĝis la ĉefa germana urbo je la unua. Tie ni atendis niajn hispanajn partnerojn. Dume ni vizitis la faman muzeon de Pergamo – la antikvaj greka kaj babilona mondoj translokigita al centro de Eŭropo! – la katedralon; trapasis la pordegojn de Brandenburgo – imagante la muŝon, kiu antaŭ nelonge dividis la urbon kaj la mondon – promenis laŭ la strato de «Under den Linden». Postdama placo, Aleksandra placo kaj la televida turo plenigis nian vagadon laŭ la urbo, preskaŭ ĉiam per subtera fervojo.

Lunde, la 4an de aprilo, kune kun niaj hispanaj partneroj, per buso ni revizitis kelkajn ĉi-lokojn kaj posttagmeze ekveturis al urbo Koŝalino, en pola Pomerio, ĉirkaŭ tricent kilometroj for. Ricevitaj de niaj partneroj kaj siaj familianoj en lernejo ĉiu ripozis hejme de sia gastiganto. De mardo ĝis sabato, la programo kreita de niaj polaj partneroj inkuzivis vizitojn al gastiganta urbo Koŝalino, al la fama urbo Gdansko, kaj al ripozloka

vilaĝo Mielno ĉe la Balta Maro; promenadon al monto Chetmska ĉe Koŝalino; krom klasoj de Esperanto kaj la pola lingvoj dum du matenoj en la lernejo. Tamen ne ĉiu programero plenumiĝis, ĉar pro la morto de la papo Joahno Paŭlo la Dua okazis nacia funebra tago, vendrede, je la oka de aprilo.

Bedaŭrinde la programero pli rompita estis precize tiu pri lingvoj. Tio tre malhelpis la uzon de la internacia lingvo kaj la eklernon de la pola. Tamen pro afableco de la prezidanto de loka filio de Pola E-Asocio, s-ro Ĉeslavo Baranowski, ni rajtis ĉiĉeronadon Esperantlingve tra la urbo. Kaj pro ĝentileco de niaj gastigantoj facile ni lernis komunuzajn polajn esprimojn por saluti, danki, ktp.

Dimanĉe, je la kvina, alvenis la adiaŭa horo. Ĉio finas kaj ni adiaŭante niajn afablajn gastigantojn busveturis denove ĝis Berlino. Malvarmis la vetero kelkfoje, tamen alifoje eĉ printempis en Koŝalino. Sunis kaj pluvis kaj ni spertis preskaŭ ĉiujn sezonojn. Dum la antaŭa restado en Berlino ĉiam printempis. Veturante tra Pomerio rekte al flughaveno ni spertis la mankantan sezonon: neĝis! Nu, nur neĝetis, sed la kampoj iom blankiĝis. Sur la ŝoseo tamen la neĝeroj falis kiel likvida akvo. Tre amuza adiaŭo!

Post halto ĉe benzinejo alvenis la ĝisa horo por niaj hispanaj partneroj. Flugante per malsamaj flugkompanioj la iberaj partneroj veturis al siaj malsamaj flughavenoj.

Tiel finis nia ĝoja AKEL-kunvivado, atendante novan renkontiĝon ve-

nonte lernojare, kvankan sen la polaj partneroj. Anstataŭos ilin litova lernejo.

Aprilo 2005

Luís Ladeira

kunordiganto de la projekto AKEL-1



ILEI iĝis oficiala patrono de pola lernejo

La 16an de aprilo 2005 en Czajowice, Pollando, estis subskribita Interkonsento inter la lernejo de Czajowice kaj ILEI, laŭ kiu ILEI iĝis oficiala patrono de la lernejo. La pola sekcio de ILEI, kiu tre proksime kunlaboras kun la lernejo ekde aŭgusto 2004, daŭrigos la kunlaboron kiel reprezentanto de ILEI. La plano estas kunordigi ĉiujn lernejojn en Pollando kie Esperanto estas instruata kaj utiligata.

La interkonsenton subskribis la direktorino de la lernejo, Agnieszka Basista kaj, nome de ILEI, la ILEI-komitatanino, Maria Majerczak. Post la manpremo estis tralegita la speciala salutmesaĝo de la Prezidanto de ILEI, Radojica Petrović, kaj interŝanĝitaj simbolaj donacetoj: floro, kun simbolaj signifoj de la koloroj kaj longdaŭreco de la planto, kaj ringo kun la verda stelo simbolanta gvidadon kaj kunigadon. Dum la ceremonio regis tre solena kaj ĝoja etoso. La tutan aranĝon planis kaj kunordigis Maria Majerczak. Foto-raporto aperos en Interreto.

La sfero de la kunlaboro difinita per la interkonsento estas eduka-

do, sen financaj devigoj. Ĝi ligiĝas al universalaj kaj ĉiutempaj valoroj de Esperanto, kiuj estas komuna komprentereno de la esperantistoj kun la aliaj homoj. Krom tiuj, la Internacia Lingvo proponas al la lernejoj ĉiam kreskantan nombron kaj rangon de praktikaj uzoj. Ĉie ekzistas homoj malfermaj, larĝmensaj, aktivaj, ofte ne sciantaj pri tiuj ebloj, ravitaj ekkoninte ilin, kaj pretaj utiligi Esperanton. Tio pli vaste malfermas la vojon al la ĉefa agadtereno de ILEI – la lernejoj. Ni informu! Ni instruu!

Tio inspiris la kunlaboron de la pola sekcio kun la lernejo de Czajowice, kiu nun, per la interkonsento pri patroneco, fariĝis ILEI-lernejo. Tio jam sugestas pozitivan respondon al la titola demando. Ĉu ĉiu sekcio de ILEI povas fari ion similan? Ĉu ni povos krei tutmondan reton de ILEI-lernejoj? Certe jes, se ĉiu sekcio faros tion en sia lando.

Scienca Festivalo

En Krakovo, urbo kun 18 superaj lernejoj, en kiuj studas pli ol 120 000 personoj, okazas granda Scienc-Festivalo. En diversaj lokoj de la urbo la superaj lernejoj prezentas al la larĝa publiko iujn inter siaj studdomenoj kaj sciencaj atingoj.

Kiel en la pasintaj jaroj, Esperanto estis elektita inter la lingvoj, kiujn prezentas la loka Jagelona Universitato, unu el la plej malnovaj en Eŭropo. La riĉan prezenton de la Internacia Lingvo, okazantan la 18an kaj 19an de majo (11–17 h.) sur la malnova

krakova Ĉefplaco, preparis ĉefe Ewelina Tokarczyk, studentino en la fako Internaciaj Rilatoj. Okazis konkursoj (kun E-premioj) por preterpasantoj, pri: – scioj pri Eo, – rekonado de famaj land- kaj mondliteraturaj verkoj laŭ ilia E-traduko, – Esperanta karaokeo.

Membroj de la universitata Studenta Scienca E-Rondo informas pri la lingvo, ties kulturo kaj praktikaj aplikoj, faras mikro-kursojn de Eo, disdonas gazetajn artikolojn pri ĝi kaj centojn da ekzempleroj de la 4-paĝa flugfolio kaj 1-paĝa baza prezento de la lingvo, kiujn Ewelina preparis. La koston de la kopiado pagis la universitato.

La fragmenton de la oficiala festivala programo (en la pola) oni povas trovi ĉe: www.festiwalnauki.krakow.pl.

Esperanto en internacia junulara festivalo en Germanio

Al la neesperantista Internacia Studenta Semajno en Ilmenau, Germanio (21–28 majo 2005), aliĝis por prelegi pri E-rilataj temoj tri membroj de la Studenta Scienca E-Rondo de Jagelona Universitato en Krakovo. Ili preparis jenajn anglalingvajn prelegojn:

– Magdalena Sławińska, studentino de psikologio (sub gvido de prof. Radojica Petrović) – La projekto INTERKULTURO por pli bona interkompreniĝo;

– Szymon Szymczak, diplomito pri

filozofio – Filozofiaj premiosoj de planlingvoj (prezentota de W. Surma)

– Małgorzata Nitkowska, studentino en Jag. Univ. (angla filologio) kaj en la E-fako de Poznań (sub gvido de Maria Majerczak) – ESPERANTO – la lingvo kaj ties filozofio.

La aranĝon partoprenos 700 gejunuloj el ĉ. 100 landoj. La festivala temo „UNU MONDO, UNU VIZIO” ja estas proksima al la esperantistoj! Plaĉaj estas ankaŭ: la slogano „Ni invitas revantojn, kiuj pensas kaj pensantojn, kiuj revas... kaj agas” kaj la afiŝo. La partoprenantoj serĉos respondon al la demando: „Kiel certigi daŭran pacon?”

Tiujn samcelajn „revantojn, kiuj pensas [...] kaj agas”, devus atingi nia informagado. La laborlingvo de la festivalo estos – ankaŭ por la germanoj – la angla. Nekonantoj de tiu lingvo ne povis aliĝi.

Antaŭ ol uzi la forumon en la retapĝo de la festivalo, la gejunuloj legas: Please use English Language! (Bv. uzi la anglan lingvon!). Sekvas argumentoj pri la neceso uzi unu lingvon.

[Nia komento:] La kreskanta uzo de la angla lingvo estas signo pri urĝa mondskala bezono de unu komuna lingvo. Ni senĉese konsciigu al ĉiuj, ke tia lingvo ekzistas kaj vidigu ĝin! La retpaĝo de la festivalo: <http://iswi.org/iswiworld/e-2-2a.html>

Dum simila festivalo, en la germana urbo Greifswald (4–12 junio), prelegos pri Esperanto Elisabetta Cirio, Komisiito de TEJO pri KER, el Britio.

Maria Majerczak

Agnieszka Prokurat

KIEL TRADUKIĜAS EŬROPO?



En la mondo 6,5 miliardoj da homoj parolas 3 mil lingvojn. Plej ofte oni aŭdas la ĉinan, la anglan, la hispanan kaj la hindan. Simplatage ni scipovas iamaniere regi tiun globalan Babel-turon, tamen en certaj cirkonstancoj la afero komplikiĝas. Jen en la tempoj, kiam rapide ni eliminis sekvajn limojn ekonomiajn, geografiajn kaj aliajn, certe lingvaj obstakloj okazas plu nesolvebla problemo.

EŬROLINGVO = EŬROPROBLEMO

Unuiĝo de eŭropa politiko, mastrumado, komerco, kulturo, progresas de jaroj kaj evidente alportas antaŭvideblajn efektojn. Kaj en la fono de tiu ĉi pli kaj pli granda internacia unueco kristaliĝas – kvazaŭ sendepende – lingva unueco. Parte pro la respekto al nacia alieco, iom pro teknika devo, ekestis traduk-bezono – traduki debatojn, konferencojn, dokumentojn, traktatojn, ordonojn, direktivojn. Nekalkulebla nombro da vortoj skribitaj kaj elparolataj kadre de unuiĝanta Eŭropo devas ĉiutage aŭdiĝi samtempe en 20 lingvoj.

TRO MULTE...

Dominas certe la angla, tamen fakte la Unio parolas 20 lingvojn. Tio signifas, ke oni devas jare redakti

1,5 milionojn da paĝoj de dokumentoj el la kunvenoj de la Eŭropa Parlamento, en 20 lingvaj versioj. Ĉiujare EU elspezas tiucele unu miliardon da eŭroj. Por iomete ekregi la problemon, la Eŭropa Komisiono decidis malgrandigi internajn Uniajn dokumentojn ĝis maksimume 15 paĝoj.

Oni certe ne sukcesos malgrandigi la aron de tradukistoj. En ĉiu parlamenta sesio devas partopreni 110 simultaneaj interpretistoj, tradukantaj senpaŭze debatojn.

Ofte okazas, ke traduko el ekz. la greka al la dana, okazas helpe de la angla. Tio portas grandan riskon de malprecizeco kaj eĉ erara traduko. Malgranda precizeco kaj multaj duboj igas konsekvence la kaoson, kaj sekve de tio, timigan malkomforton en la laboro de parlamentanoj kaj interpretistoj. Intensiva laboro de interpretisto postulas eksterordinaran penon kaj sperton. Interpretistoj ŝanĝiĝas post 30 minutoj – dum atendata maksimuma koncentrado ili ne estas kapablaj pli longe traduki debatojn.

MANKAS FAKULOJ

Je tio ne finiĝas tamen lingvaj problemoj. Evidentiĝas, ke ne ĉio estas tradukebla. Kaŭzo? – manko de kvalifika kadro. Ekzemple, plue malmultaj

estas interpretistoj, scipovantaj traduki dokumentojn al la baltaj lingvoj, aŭ al la maltan (Malto ĝis nun ne havas ĉefajn membro-dokumentojn en sia gepatra lingvo). Tekstoj tradukendaj por 25 ŝtatoj postulas ne nur bonegan lingvoscion, sed ankaŭ ekzaktan komponenton pri la unika, ĉefe jurista vortprovizo. Oni kalkulas, ke tiukaŭze, sole en Svedio, tradukistoj engaĝitaj por Uniaj organizaĵoj scipovas plenumi nur 30% da postulata laboro.

Tradukproblemoj rilatas dekomence al la semantika kapacito de vortoj. Ofte ne eblas transponi vorton de unu lingvo al alia sen – minimuma apenaŭ – signifo–ŝanĝo. Vortoj, depende de kunteksto, kapablas enhavi diversan kvanton kaj kvaliton de signifa informo. Ofte traduko estas jam iusence interpreto, tial en tradukitaj tekstoj povas ekesti signifaj diferencoj. Ĉio dependas de antaŭsento kaj subjektiva prijuĝo de tradukisto.

OPCIO: ESPERANTO

Bezonata estas efektive malfacila ilo de eŭropa komunikado. Kompreneble tion jam en la XIX jc. varsovia kuracisto Ludwik Zamenhof, kaj dum dekelkaj jaroj kreis la lingvon helan, facilan kaj agrablan – Esperanto. Artefarita lingvo devis esti neŭtrala kaj logika komunikilo. Devis ligi homojn de diversaj nacioj kaj kulturoj. Rapiĝe oni povus eklerni ĝin, ankaŭ pro ĝiaj hindoeŭropaj radikoj. Esperantistoj eldonas sufiĉe multajn lernolibrojn kaj vortarojn. Ĉefa gramatika

premisio estas ties maksimuma simpleco. Ne ekzistas gramatikaj genroj, estas nur unu konjugacio, pluralo estas farata ĉiam laŭ sama maniero, vortoj ŝanĝiĝas al sia kontraŭa signifo ĉiam per aldono de unu prefikso. Esperantistoj asertas, ke por flua konjugacio de ĉiu verbo en ĉiu tenso sufiĉas duonhoro de lernado. Ne ekzistas esceptoj, estas nur unusignifaj principoj. Aldone, ĝi estas lingvo fonetika – ĉiujn vortojn oni elparolas precize tiel, kiel ili estas skribitaj.

Vortprovizo en 75% devenas de la latino kaj latinidaj lingvoj. Por la krento [de Esperanto – red.] prioritata estis rekonebleco de terminoj en kiel eble plej multaj lingvoj. Tial poloj en averaĝa Esperanta teksto kapablas rekoni eĉ 40% da vortoj.

LINGVA DEMOKRATIO

Fervoraj adeptoj de Esperanto citas optimismajn statistikojn (Esperanto kiel dua, post la angla, lingvo de interretanoj, mondaj radioelsendejoj aŭdigantaj en Esperanto – inter ili Pola Radio, revuoj kaj libroj eldonataj sub ŝildo de verda stelo – simbolo de espero el la Esperanta flago). Tamen ĉio montras, ke artefarita lingvo ne havas ŝancojn entute alkiutiĝi en la, ligita de tradicio, Eŭropo. Kaj eble ĉi tiuj ecoj, kiuj premise devis esti atutoj de Esperanto – supernacieco, sendependeco de komplikitaj influoj de nacia kulturo kaj historio – evidentiĝis la plej granda obstaklo, pro kiu malfacilas akcepti tiun ĉi lingvan kreitaĵon? Eble ĝuste tion ni serĉas en la lingvo? Eble ni bezonas diferencojn, nacian

individuecon, kondensitan en la vorto, sendepende de milionoj da tradukataj jare paĝoj?

elpoligis: Kazimierz Leja

Ĉi artikolo aperis en la monata revuo/bulteno de polaj farmaciaĵoj „ACP Pharma”, n-ro 6/2005, eldonkvanto 2400 ekz. La aŭtorino, loĝanta en Gdansko, eksciis pri Esperanto el Interreto, kie ankaŭ ŝi trovis bezonatajn informojn por prepari ĉi-supran artikolon.



Artikolo pri Antoni Grabowski venkis dufoje

Ĉiusemajne en la internacia enciklopedia projekto Vikipedio partoprenantoj elektas unu interesan artikolon por „Traduko de la Semajno”. Ankaŭ ĉi-semajne okazis tia elekto. Kaj en ĝi gajnis (dank’ al subteno de E-parolantaj vikipediistoj) la artikolo pri Grabowski.

La artikolo venkis dufoje: ĝi ne nur estas elektita, sed ĝi ankaŭ estas jam tradukita al rekorda kvanto de lingvoj (28, kaj ankoraŭ restas du tagoj!).

La alia rekordo de la venkinta artikolo estas, ke ĝi venkis sen anglalingva versio (kiu aperis poste, supezeble tradukita de la germana). Kutime en la „Traduko de la Semajno” pli facile venkas anglalingvaj artikoloj, sed la artikolo pri Grabowski antaŭ la nomumo estis nur en la lingvoj ĉeĥa, germana, franca, rusa kaj Esperanto.

La artikolon kandidatigis por „Traduko de la Semajno” kaj preparis ĝian ruslingvan version mi.

La artikolo pri Grabowski, „la patro de Esperanta poezio”, laborinta ankaŭ en la rusa urbo Ivanovo, ne estas la unua pri-Esperanta artikolo, venkinta en „Traduko de la Semajno” — antaŭe simile furoris artikolo pri Moresnet, ŝateca teritorio en okcidenta Eŭropo, kie Esperanto dum mallonga tempo funkciis kiel oficiala lingvo.

Sendube venko de pri-Esperantaj artikoloj estas interesa atingo, kiu metas informon pri nia lingvo kaj movado senpere al la „celpubliko” – medio de interesigemaj intelektuloj, kiuj partoprenas Vikipedion tutmonde.

Bondezire,

Slavik V. Ivanov
slavik@ikso.net
el: e-rus-info

Spiritaj Ekzercoj en Józefów

La 10an de septembro 2005 Esperanto-Sekcio ĉe la Klubo de Katalika Intelektularo en Varsovio organizas Spiritajn Ekzercojn en Józefów apud Varsovio. La aranĝo okazos de la 10a ĝis la 18a horo en la monaĥejo.

Pli precizajn informojn oni povas ricevi de s-ro Bohdan Wasilewski, ul. Plantowa 4 m 23, 05-804 Pruszków.

Bogusław Sobol

Historia libro: kongresoj kaj multe pli

„Sed homoj kun homoj”, historio pri cent jaroj de Universalaj Kongresoj



Ziko Marcus Sikosek: „Sed homoj kun homoj. Universalaj Kongresoj de Esperanto 1905–2005”, Rotterdam: UEA, 2005. 197 paĝoj. 24cm. Prezo: broŝurita 21,00 EUR, bindita 30,00 EUR; triona rabato ekde 3 ekz.; aldoniĝas sendokostoj kaj, por EU-landoj, imposto de 6%.

La unua libro, kiun UEA eldonis ĉi-jare, estas forta kandidato por fariĝi la ĉefa furoraĵo de la Esperanta libromarkato en 2004. Temas pri la libro „Sed homoj kun homoj” de la juna germana historiisto Ziko M. Sikosek pri la 100-jara historio de Universalaj Kongresoj de Esperanto. La aŭtoro, jam konata pro „Esperanto sen mitoj”, prezentas en sia nova verko naŭdek ĉapitrojn pri naŭdek kongresoj, krome longan enkondukon pri la historio de la kongres-organizado ĝenerale.

Kiam alproksimiĝis la jubilea jaro 2005, UEA komisiis al Sikosek la verkadon de por-okaza libro, facile legebla, riĉe ilustrita, kiu direktas sin al la tuta esperantistaro. Sikosek esploris en la Biblioteko Hector Hodler, intervjuis oficistojn eksajn kaj nunajn kaj partoprenintojn de UK-oj. Rezultis libro verkita en ĵurnalisma, flua stilo. Tamen en la fino de la libro aperas la necesaj fonto-indikoj. La anekdo-

to-plena verko ne nur estas amuza, sed ĝi ankaŭ klerigas la leganton pri la Esperanto-movado ĝenerale: la UK estis ĉiam ja ankaŭ forumo por asocioj, artistoj, sciencistoj kaj „simplaj esperantistoj”.

Sikosek: „Precipe gravis al mi, ke la ĉapitroj pri la unuopaj kongresoj havu variecon. La kongresoj ja ne radikale malsamas unu de la alia. Sekve, mi prezentas unu kongreson el la vidpunkto de komencanto, alian el tiu de la prezidanto de UEA; por la fruaj kongresoj ekzistas aliaj fontoj ol por postaj, ktp”. En enkondukaj ĉapitroj li gvidas la leganton al la diversaj epokoj, nome la frua „bela epoko”, la tempo inter la mondmilitoj, la Malvarma Milito kaj la tempo post la falo de la Berlina Muro. „Mi provis verki la libron tia, ke oni flue povas legi de la komenco ĝis la fino, aŭ ĉiam nur unu ĉapitron, ekzemple en kluba vespero aŭ je la enlita legado tagfine”.

Inter la multaj intervjuitoj, kies rememoroj kontribuis al la estiĝo de la libro, estis John Wells, Renato Corsetti, Helga kaj John Rappley kaj preskaŭ ĉiuj ankoraŭ vivantaj Konstantaj Kongresaj Sekretarioj. Sten Johansson, James Resende Piton k.a. liveris ĉapitretojn pri unuopaj temoj kiel Belartaj Konkursoj kaj poŝtmarkoj. Ankaŭ la nuna Ĝenerala

Direktoro de UEA, Osmo Buller servis al Sikosek kiel unu el liaj fontoj, kaj nun ĉiuj esperantistoj povos legi la faman epizodon pri la renkontiĝo de la juna kongreshelpanto kun Ivo Lapenna en Helsinko 1969.

Kio estis plej surpriza por Sikosek dum la verkado? „Mi ne sciis ke Humphrey Tonkin estis tiel ‘senmitiga’ – kritikema kiel junulo, li trovis en la sesdekaj jaroj tre fortajn vortojn pri la kongresoj. Foje la homoj havas interese malsaman rememoron, ekzemple kiu ekzakte fondis iun nun tradician programeron. Sukceso ŝajne havas multajn patrojn”. Ĉu Sikosek malkovris multajn mitojn kaj skandalojn? „Mi almenaŭ ne serĉis tion. La libro ja estas verkita nome de UEA, ĝi devas klopodi esti neŭtrala kaj akceptebla por pli-malpli ĉiu esperantisto. Tamen ne eblis eviti la skandalojn, kaj nun oni povas legi kial fakte Edmond Privat rezignis en 1928 aŭ kiuj estis la diferencoj inter la prezidanto Lapenna kaj la prezidanto Tonkin”.

Kun pli ol okdek bildoj la libro „Sed homoj kun homoj” estas tre alloga eldonita, pro kio ĝi bone taŭgas ankaŭ kiel donaco, eĉ por neesperantistoj. La libro estas havebla en broŝurita kaj malmole bindita versioj.

el *Gazetaraj komunikoj de UEA*

Ekskluzive por la legantoj de Pola Esperantisto:

La esperantistoj vivas en neunueco kaj neharmonio, skribis Henryk Gielb en Esperanto Internacia, kaj

samtempe timigas eksteraj „malfavoraj ondoj”. En Germanio la Movado devis „interrompi sian laboron”, ne povis partopreni en Varsovio la litovoj; la Generalidad de Catalunya sendis telegramon el la civila milito: „La hispana popolo, batalante por sia libereco kaj sendependeco, ne forgesis pri la Jubilea en Varsovio”. Per tiuj cirkonstancoj en la mondo la raportisto provis cetere senkulpiĝi mankojn en la kongresa organizado.

Kaj tio estu la granda brila jubilea Universala Kongreso – Esperanto kvindekjara. Ne. Oni emfazis la internaciecon de la kongreso, inter la salutparolantoj troviĝis usonano, papuano, japano (la japanoj jam propagandis por UK 1940 en Tokio) „kaj eĉ negro el Nigerio”. Impresis grupa himno de Julio Baghy: *Nova Sento*, bone prezentita de la orkestro en la Malfermo.

Je la funebro de Ludoviko Zamenhof en 1917, la varsovia esperantisto Leo Belmont esprimis la deziron de la pollandaj samideanoj inviti la Universalan Kongreson por 1918 al tiu urbo, ke pilgrimu senditoj el „ĉiuj mondfinoj” al la tombo de Zamenhof, kaj post la kongreso „la tuta lando pola malfermos la okulojn kaj komprenos, kiom da gloro-radioj tiu granda filo donacis al sia hejmlando”. Parte tio estis efektivebla dek jarojn poste, dum postkongreso en 1927. Nun, dudek jarojn poste, LKK-estro Bujwid metis florkronon sur la tombon de la nekonata soldato, sekve la kongresanoj veturis komune al la hebreja tombejo kaj kolektiĝis dividitaj

laŭ naciaj grupoj. Ĉe la tombo de la Majstro parolis unue Bujwid, poste Bastien priskribis lian vivon, fine salutis interalie la prezidanto de la hebrea komunumo en Varsovio, kaj rabeno. Post meto de florkronoj defilis la naciaj grupoj. „Ĉiu preteriranto ĉe la tombo klinis la kapon kaj metis floron aŭ floraron. Kreskis la amaso da diantoj kaj lilioj. Kelkiu el la trapaŝantoj haltis por momento, volis ekparoli; sed, anstataŭ vortoj, larmoj ekfluis el liaj okuloj...”. Proksime de la hebrea tombejo troviĝis la katolika, tien iris la kongresanaro pro la Esperanto-aŭtoro Antoni Grabowski. Post Bujwid parolis Julius Glück, malnova propagandisto naskita en Bohemio. „Estis neeble reteni la larmojn en la okuloj, kiam la blankbarbula Prof. Bujwid kisis la parolinton pro lia tiom profunda kaj tiom sento-kaj esprimoplena parolado”.

Z. M. Sikosek <ziko@co.uea.org>



Jen bildo kun la transdono de la libro, fare de la aŭtoro al la Konstanta Kongresa Sekretario Clay Magalhães.

Novaj Honoraj Membroj de PEA

La 20an de majo en la sidejo de varsovia filio de PEA okazis solena renkontiĝo kun honorigitaj per la titolo „**Honora membro de PEA**” kvar multjaraj aktivuloj de Esperanto-movado en Pollando. Laŭ la decido de la Ĉefa Estraro de PEA honorajn titolojn ricevis: **Irena Szanser, Eugenia Szczyglińska, Hanna Jankiewicz kaj Jerzy Leyk**. La solenaĵon partoprenis ĉiuj honorigitaj personoj krom s-ro Leyk. Polan E-Asocion reprezentis estraranoj: Bożena Gierula, Jerzy Walaszek, Aleksander Zdechlik kaj prezidanto Stanisław Mandrak.

Enmanigante la porokazajn honorajn diplomojn, prezidanto de PEA dankis al honorigitoj kaj petis akcepti la tutkoran pardonpeton pro la ĉiuj malbonaĵoj kiuj tuŝis esperantistojn flanke de eksaj estraroj, agantaj dum la totalitara tempo. Speciale petis akcepti senkulpigon al tiuj kiuj suferis dum tiel nomata „esperantista varsovia puĉo”.

S-ino Szanser nome de honorigitoj dankis al la estraro de PEA kaj substrekis ke je tiuj vortoj ŝi kaj aliaj atendadis 20 jarojn. Poste ŝi transdonis al prezidanto dikan karegon kun granda stoko da kopiitaj materialoj pri ŝia longjara agado en PEA, kiu ankaŭ enhavas dokumentojn pri menciita jam „puĉo”.

Dum solenaĵo oni babilis pri eksa kaj aktuala situacio de la E-mova-

do en nia lando. Oni devas substreki, ke bonege la tutan solenaĵon preparis Veterana Sekcio de PEA sub la gvido de s-ro Bohdan Wasilewski. Post la solenaĵo estraranoj de PEA akompanataj de gekolegoj el Varsovio vizitis la tombojn de Ludoviko Lazaro Zamenhof kaj de episkopo Władysław Miziołek. Sur ambaŭ tombojn estis metitaj floroj kaj ekbruligitaj verdaj kandeloj.

Oni povas diri ke solenaĵo kaj litigitaj kun ĝi momentoj postlasos neforgeseblajn rememorojn.

Bonŝanca kunveno en Pelplin

La 22an de majo 2005 j. okazis rutina sed unua ĉijare estrara kunveno de Pola Esperanto-Asocio en Pelplin. Denove invititaj de gastemaj pelplinaj esperantistoj, estraranoj de PEA ne nur partoprenis XX-jaran datrevenon de la Esperanto-Movado en Pelplin, sed havis okazon konstati dum la estrara kunsido neatenditan interesigon pri Esperanto kaj reaktiviĝon de lokaj E-grupoj en Pollando.

Post oficiala malfermo de la kunsido prezidanto de PEA Stanisław Mandrak referis lokajn E-iniciatojn en Góra, Zakopane, Lublin, Gierałtowiec, Rokitki, Przemyśl kaj Dąbrowa Górnicza, substrekante ilian aktivecon sendependan de regula promociado fare de Pola Esperanto-Asocio.

Post la optimismaj konkludoj rezultitaj de la novaj E-aktivecoj en Pol-

lando, la prezidanto petis detalan raporton de Andrzej Kiszkiel pri la ĝemelurba aktiveco inter urbestroj de urboj Góra kaj Herzberg.

Poste tralegis „malferman leteron” de Ireneusz Bobrzak pri lia kunlaboro kun varsovia junularo ĝis organizo de la Internacia Junulara Kongreso en Zakopane, kie akcentita estis apoga rolo de PEA en junulara aktiveco.

Fine de la letero junaj organizantoj invitis la prezidanton de PEA kaj E-aktivulojn partopreni la kongreson en Zakopane.

Enkadre de pli moderna kaj pli kompleksa E-popularigado proponata estis informa „malferma letero” direktota al polaj lernejoj, celanta enkondukon de pli profesia E-promociado kaj celanta plialtigon de konscienco pri lingvo internacia kaj ĝia rolo en moderna mondo.

Ankaŭ priparolata estis graveco de partoprenado de E-reprezentantoj dum inaŭguro de lerneja jaro kaj antaŭpreparo de instrumaterialoj por E-kursoj.

La financa situacio de PEA relative pliboniĝis, sed eĉ pozitivaj juraj decidoj bremsas ankoraŭ financon kaj organizan aktivecon per longdaŭraj kaj senfinaj procedoj.

Kiel lasta temo priparolata estis propono de la prezidanto de UEA asigni titolon de la honora membro de UEA al iu merita polo.

Finante la debatojn, la prezidanto de PEA dankis iniciatan aktivecon de partoprenantoj kaj aparte gastemon de pelplinaj E-organizantoj.

Raportis: J. A.Walaszek

Ĉu sanktuloj parolas Esperanton?

En Pollando aperis pollingva libro „Czy święci mówią w esperanto” („Ĉu sanktuloj parolas Esperanton”) de Katarzyna Tempczyk, kolektanta informojn pri diversaj rilatoj inter Esperanto kaj kristanaj eklezioj.

La libro priskribas detale i.a. malfacilan komencon de *Espero Katolika* kaj la figuron de ĝia kreinto sac. Peltier, prezentas kreintojn de IKUE, traktas pri partopreno de sanktuloj kaj beatuloj en la Esperanto-movado, ekleziaj dokumentoj traktantaj pri uzo de la zamenhofa lingvo en liturgia, sakramenta vivo, Esperanto-elsendoj de la Vatikana Radio kaj esperanlingvaj motivoj en preĝejoj; montras partoprenon de episkopoj kaj statistikojn pri partopreno de sacerdotoj en la Esperanto-movado.

La aŭtorino, diplomitino de la katolika teologio, koncentriĝas tamen ne nur pri la Romkatolika Eklezio, pritraktante ankaŭ uzon de Esperanto en aliaj kristanaj eklezioj. La libro priskribas i.a. organizitaj de la eklezia hierarkio provojn de disvastigo de Esperanto en poldevena Mariavita Eklezio.

En aparta ĉapitro ĝi prezentas pionirecon de ekumenaj iniciativoj faritaj de esperantistoj jam antaŭ cent jaroj.

Katarzyna Tempczyk, Czy święci mówią w esperanto, Malbork 2005, 124 paĝoj. La libron oni povas mendi skribante al retadreso:

katarzyna_tempczyk@o2.pl

„Juna amiko” aperas kun pli dika aspekto

Aperis la unua numero de *Juna amiko* por la jaro, kaj la unua laŭ la nova 52-paĝa amplekso. Kvar plenkoloraj kovril-paĝoj entenas buntan sandviĉon da novaĵoj kaj legindaĵoj. Se vi mem ne abonas, kontaktu peranton por vidi specimenon kaj aboni. Meze de la revuo estas 6-paĝa sekcio por subteni kaj prezenti la projekton „Interkulturo”. Mondmapo montras, kie troviĝas ĝiaj grupoj, tekstoj klarigas ĝian celon kaj oferton kaj donas ekzemplojn pri la enhavo de la ret-paĝaro de la projekto kaj invitas al novuloj aliĝi.

Vizitu la ret-paĝon de *Juna amiko* ĉe www.junamiko.inf.hu por vidi liston de perantoj, la bazan vortliston de la revuo, kaj pli. Por vidi artikolojn el malnovaj numeroj iru al www.lernu.net, kie vi trovos rubrikon *Juna Amiko* en la biblioteko.

Ni jam havas 650 abonantojn por la jaro. Por ke la revuo vere prosperu, ni bezonas 800. Estu vi unu el ili! *Juna amiko* transformiĝis – nova grafiko, novaj rubrikoj, nova spirito. Provu nun!

Al ĉiuj biciklantoj!

Unue kelkajn vortojn pri mi mem. Mi nomiĝas Kazimierz Okoński. Mi havas jam kvindek jarojn, sed mi sentas min tre juna (mi garantias!). Mi estas edziĝinta, kaj havas du filojn.

daŭrigo kovrilpaĝe

PRESKAŬ ĈIO PRI LA PREPOZICIO „DE”

Estas sciate, ke la prepozicio **de** funkcias kiel baza ligilo inter du substantivoj, ke ĝi rilatas ne nur al substantivo sed ankaŭ al: verbo, adjektivo kaj adverbo, ke ĝi povas funkcii kiel prefiksoido (**deveni**, **deformi**, **detranĉi**, **detiri**, **deturni**, **depuŝi**, **dekalkuli**, **dependi**, **desalti**, **degradi**, **deflui**, **delonge**, **denaska**, **deflankiĝi**, **deĉevaliĝi**, **devojiĝi**).

Rilatante al substantivo la prepozicio „de” montras:

- **la posedanton aŭ la posedantan econ**: la libro **de** Petro; la domo **de** mia patro; la ĉambro **de** servistino; la filo **de** la reĝo; la iluzio **de** David Copperfield;

muzikisto **de** granda talento; virino **de** meza aĝo; sakoj **de** diversaj grandecoj.

Rimarko 1. Ne nur la poseda suplemento havas ĉiam la prepozicion **de**. Tie ĉi oni povas klasi ankaŭ la nom-suplementon: **ekz.** la strato **de** Ludoviko Zamenhof; la Placo **de** la Konkordo; la dimanĉo **de** Pasko; la tago **de** Sankta Johano.

- **la alligitaĵon**: la ĉirkaŭaĵo **de** Koszalin; la golfo **de** Puck; la valo **de** Vistulo;

la arbarego **de** Białowieża; la altaĵo **de** Krakovo; la parko **de** Pieniny.

- la rilaton inter du substantivoj, el kiuj la dua estas mezuro de la unua:

Tiu ĉi lumturo havas la alton **de** 36 metroj. Li atingis jam la aĝon **de** 70 jaroj.

Vi ŝuldas al mi la sumon **de** mil zlotoj. Mi multon faris en la daŭro **de** unu jaro.

- **la kvanton de konata, ĵus parolita aĵo**:

Donu al mi pecon **de** via torto. Prenu duonon **de** mia papavkuko. Ĉu vi trinkos nun iom **de** mia vino? (**sed**: Ĉu vi trinkos nun iom **da** vino?).

Rimarko 2. Post duono, triono, kvarono ktp. oni devas ĉiam uzi **de**: tri estas duono **de** ses; li pagis trionon **de** sia ŝuldo; pasis jam kvarono **de** la jaro 2005.

La prepozicio **de** estas uzata ankaŭ post la vortoj: parto, frakcio, sekcio.

- **la aganton aŭ objekton de la ago**, kiun esprimas substantivo derivita el verbo: la amo **de** la gepatroj al siaj infanoj; la ekspluatado **de** la homo per la homo; la uzado **de** Esperanto en interreto.

- **la parton, membron** (de io aŭ iu): la piedo **de** mia seĝo; la okuloj **de** nia filino; la plej alta pinto **de** Himalajo; la kornobranĉo **de** cervo; la dentoj **de** ŝarko.

- **la agosferon** (temas pri gvidantoj, ĉefoj): profesoro **de** lingvoj, instruisto **de** dancado, ĉefredaktoro

de gazeto, direktoro de lernejo, rektoro de universitato.

- la gramatikan dependecon, ankaŭ kun iom malpreciza senco: malaltiĝanta prezo de butero; duba sukceso de la registaro; longedaŭra blokado de emeritaĵoj; erara konkludo de la parolado; kreskanta utileco de Esperanto.

Rimarko 3. Pro la multisenceco de la prepozicio de oni povas anstataŭigi ĝin (se eblas) per unu el pli precizaj prepozicioj: **en, el, pri, pro, por, super:**

la kongreso **en** Varsovio; la konkludo **el** la kunveno; profesoro **pri** retoriko; atesto **pri** kapableco; li estas konata **pro** sia ĝentileco; la preparoj **por** la festo; li akceptis honorprotektecon **super** la aranĝo. **Ni memoru:** super la domo (= pli alte ol la domo); supre **de** la domo (= en ĝia plej alta parto).

Rilatante al verbo la prepozicio „de” montras:

- la punkton de la spaco, kie komenciĝas movo (la deiron, la devenon): Ni veturis **de** Varsovio ĝis Mielno. Ili vagis sen celo **de** loko al loko. Nia bebo infankrablis **de** la por-do ĝis la fenestro. Juna rajdanto desaltis **de** (= **de sur**) la ĉevalo. La vento veninta **de** la nordo forblovis la ĉapon **de** mia kapo.

- la tempo-punkton de kiu komenciĝas aŭ daŭras ago (stato):

Li laboras **de** lundo ĝis vendredo. Ili lernas **de** la oka horo matene. Ŝi zorgas **pri** la infanoj **de** mateno ĝis vespero. Mia patrino malsanas jam **de** du monatoj.

Mi sciigas, ke **de** nun la ŝuldoj de mia edzo ne estos pagataj de mi.

Rimarko 4. Por montri klare, ke temas pri tempo oni povas uzi **ekde** (= de la komenco de...), **de post, de antaŭ**. Rilate al tempo-punkto, **ekde kaj de post** estas samsignifaj: **de post** lia morto estas egala al **ekde** lia morto, tamen se la temp-adjekto signas daŭron, la sencoj estas malsamaj: **ekde** signifas **de la komenco de**, dum **de post** signifas de la fino de. Tiamaniere **ekde** lia morto egalvaloras ankaŭ kun **de post** lia vivo; ekde tri jaroj estas proksimume samsignifa kun de antaŭ tri jaroj. Proksimuman tempo-punkton oni povas esprimi ankaŭ per **de ĉirkaŭ**: **ekz.** Mi laboras **de ĉirkaŭ** la oka. Anstataŭ **ekde** oni povas uzi **jam** kun akuzativo. **Ekz.:** Li jam 10 jarojn serĉas laboron.

- la metaforan originon, la kaŭzon: Li estis maltrankvila **de** timo. Malsanulo tremis **de** febro. Ŝi ebriiĝis **de** vino kaj poste ruĝiĝis **de** honto. Li radiis **de** feliĉo kaj ŝi kantis **de** ĝojo. Multaj senhejmuloj mortas vintre **de** malvarmo.

- la aganton de la ago, esprimata per pasiva aŭ pasivsenca verbo: Ŝi estas amata de ĉiuj gefamilianoj. Jubileulo estis ĉirkaŭita de siaj kunlaborantoj.

Kelkaj branĉoj en mia ĝardeno estas rompitaj **de** vento. Vintre la tero estis kovrita **de** neĝo. La kongresejo estis dekoraciita **de** multaj naciaj flagoj.

Rimarko 5. Por precizigi la aganton de la ago oni povas uzi **fare de** (aŭ **far**). **Ekz.:** la nutrado **de** la infanoj.

noj **fare de** ilia patrino; la realigo **de** la plano **de** la registaro **fare de** la ĉefministro; vespera amuzo **fare de** kantistoj. **Atenton!**

Apud **fare de** estas uzata la formo **far' de**, analoga al **dank' al** (la murdo **far' de** Petro). Estas praktikata ankaŭ uzado de la senfinaĵa **far**, analoge al **per** apud **pere de** (la akcepto de esperantistoj **far** la urbestro).

Rilatante al adjektivo kaj adverbo la prepozicio „de” montras la gramatikan dependecon: Glaso estas plena **de** akvo. Ŝi estas malkontenta **de** si mem. Meze **de** la urbo troviĝas modernaj butikoj. Komence **de** majo estos bela vetero. Sekve **de** inundo dronis kelkaj homoj. Li perdis la vivon kaŭze **de** malatento kaj lia amiko saviĝis helpe **de** naĝtabulo. Mi ŝatas promeni laŭlonge **de** la marbordo. Najbare **de** Sporta Hotelo troviĝas stadiono. Interne **de** la aŭto sidis du personoj. Mi salutis ilin komisie **de** mia grupo (= en la nomo de...).

Jen kelkaj aliaj **de-prepoziciaĵoj** sufiĉe ofte uzataj de esperantistoj: aparte **de**, ĉirkaŭe **de**, dekstre **de**, okcidente **de**, depende **de**, escepte **de**, fine **de**, supre **de**, interne **de**, najbare **de**, aliflanke **de**, okaze **de**, rezulte **de**.

Rimarko 6. La prepozicion **de** oni uzas ankaŭ por difini daton: Hodiaŭ estas la 20a **de** aprilo kaj mi venos al vi la 1an **de** majo. L. L. Zamenhof naskiĝis la 15an **de** decembro 1859 kaj mortis la 14an **de** aprilo 1917 jaro.

Rimarko 7. Por klareco oni po-

vas uzi **for de** aŭ **disde** (= apartigite for de): La policano prenis la ŝtelitan monon **for de** la rabisto (**disde** la rabisto). Li iris **for de** la domo. Ni veturu **for de** ĉi-tie. Ŝi demetis la turkon **for de** la kapo.

Finante mi aldonas kelkajn proverbojn kun la prepozicio **de** el la **Proverbaro Esperanta** prilaborita de Ludoviko L. Zamenhof. Nia majstro skribis klare: „konado de proverboj estas necesa por perfekta konado de la lingvo”.

- De bona vorto longo ne doloras. De guto post guto disfalas granito.
- De zorgoj, ne de jaroj, blankiĝas la haroj. Matena horo estas plena de oro.
- De parolo ĝis faro estas tre malproksime. Vidi nur ĝis la pinto de sia nazo.
- Kie estas harmonio, estas beno de Dio. Kontraŭ volo de Dio helpas nenio.
- Saĝa estas la frato post ricevo de l' bato. De tro da pano venas malsano.
- Peko kaj eraro estas ecoj de l' homaro. For de l' okuloj, for de la koro.

Laste aperis!

Jana Melichárková
Esperanto dla
dzieci. Eldonejo
Hejme, 2005.
Pola versio de la
konata ĉeĥa eldono.





Mi laboras en la enterpreno, en kiu oni produktas aŭtomobilojn. Ekster la profesiaj aferoj mi okupiĝas ankaŭ pri turismo. Mi agas en la Pola Turisma Landkoniga Societo (PTLS). Aktuale mi estas la prezidanto de la Bicikla Klubo „GRONIE” de PTLs, filio en Tychy. Rigardu la interretan paĝon: www.gronie.org.

De ĉiam biciklo estas por mi dua granda amo! Nia klubo organizas ĉiujare po kelkajn aranĝojn. Kompreneble ĉijare ankaŭ. Tial mi volas scii, ĉu en nia lando vivas ankaŭ aliaj biciklantoj-esperantistoj. En septembro (3-4.09.2005) ni organizas XV Tyski Zlot Turystów Kolarzy. Estus bone, se inter la biciklantoj ankaŭ estus grupo de esperantistoj. Mi esperas, ke ne nur el nia lando.

Precizajn informojn mi anoncos en la venonta numero de la revuo, ankaŭ per la interreto.

Kun sinceraj bondeziroj

Kazimierz Okoński
k.okonski@gronie.org

* * *

Jena informero aperis en NUN: **Vartisitino por infanoj** **serĉata**

Saluton,

Ni ambaŭ parolas Esperanton kaj havas du infanojn. Por instrui al niaj infanoj la internacian lingvon kaj por malplikomplikigi nian vivon, ni serĉas esperantlingvan vartistinon (‘au pair’) ekde septembro. Ni pensis pri polino, sed ankaŭ kandidato el alia lando es-

tas bonvena. La celo estus i.a. helpi en la dommastrumado kaj porti la infanojn al lernejo. La vartistino havos propran ĉambron kaj ni kompreneble pagos por la laboro. Ni loĝas en Gent, Belgio. Interesitoj bv. sin anonci ĉe yves.nevelsteen@telenet.be.

Yves Nevelsteen

* * *

En pola gazeto TYGODNIK NAD-WIŚLAŃSKI el 17 de marto 2005 aperis granda artikolo pri Esperanto ĝenerale kaj pri agado de E-klubo en Staszów.

Andrzej Sochacki

* * *

La Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo en Bydgoszcz proponas interesan kunlaboron al E-instruistoj pretantaj trovi en sia loĝloko studentojn kaj esti ties konsultantoj.

Informoj:

stud@esperanto-turismo.com

* * *

KOMUNIKO EL LA CO

La Centra Oficejo de UEA travivas malfacilan periodon pro longdaŭra malsano de sia ĉefkontisto s-ro Marvin H. Stanley. Kvankam intertempe la antaŭa direktoro de la CO, s-ro Pasquale Zapelli, ekdeĵoris kiel duontempa administra oficisto, foresto de la ĉefkontisto neeviteble lezas la funkciadon de la CO. Pro eventualaj malglataĵoj en la plenumado de servoj mi petas komprenemon de la membroj.

Osmo Buller

Ĝenerala Direktoro de UEA